

LA

PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII, SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kê 20'—; fremdlando Kê 25'— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
 lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

ANTAŬEN ĜIS LA VENKO!

En la daŭro de la pasintaj dekdu monatoj, la bona ŝipo Esperanto veturis sur frankvilaj maroj, sed kvankam ĝi faris bonan progreson, ankoraŭ estas longa distanco inter ĝi kaj la sopirita haveno de niaj esperoj. La ŝipanoj nepre devas laboradi senĉese por gvidi ĝin laŭlonge de rokoj kaj sablaroj, devas provizi ĝin per la necesajoj por havigi la potencon veturi antaŭen senhalte. En unu vorto, ni devas havigi pli kaj pli da monrimedoj por plifortigi nian propagandon. Mi ne intencas peŝi de la samideanaro monon hodiaŭ. Mi nur deziras rememorigi ilin, ke nia afero dependas de tri faktoroj; laborado, pacienco kaj mono. Laborado sen pacienco ne daŭras longe. Laborado kaj pacienco sen financa helpo ne havigas grandiozajn rezultatojn.

Ne estas necese esti milionulo por fari financon helpon al nia afero. Eĉ la plej malriĉaj povas fari e trovi metodon por antaŭenpuŝadi nian lingvon. ... Kiamaniere? Jen kelkaj sugesoj:

1. — Ĉu vi jam fariĝis ano de via **NACIA ASOCIO**? Se ne, bonvolu pripensi la eblecon senprokraste, ĉar sen via aliĝo la propagando de Esperanto en via lando nepre suferos! Bona esperantisto estas tiu, kiu helpas laŭ ĉiuj povoj, — ne nur tiu, kiu faras nur publikajn paroladojn. Ĉiu el ni kapablas helpi.

2. UEA jam faris grandajn praktikajn servojn al nia movado; sed se vi tuj aliĝus al tiu asocio, kune kun mil aliaj samideanoj, UEA gajnus pli grandan

potencon kaj kapablas fari eĉ pli bonajn servojn ol antaŭe.

3. Se restas al vi ankoraŭ monrimedoj aŭ se via kas-stato tion permesas ĝenerale, helpu ankoraŭ al aliaj Esperanto-entreprenoj, kiel ekzemple al la subteninda semajna organo „Heroldo de Esperanto“! Pligrandiĝo de ĝi signifus plifortigon de nia diversfanka propagando.

4. Fine ne forgesu la **Esperanto-oferojn** por disvastigi bonan kaj utilan literaturon en Esperanto!

Aĉetante seriozajn eldonaĵojn vi praktike helpas al la plenumo de la kultur-tasko de nia lingvo.

Helpu al ni, kaj ni, reciproke, faros ĉion laŭpove por helpi al vi. En Budapeŝto la ICK esprimis **sian pretecon helpi al la naciaj societoj** ri ate la plifortigon de ilia interna organizado. Tial se en via lando ekzistas malfacilaĵoj, sendu delojn al ni kun peto — kompreneble oficiala — ke ni zorgu ekzamenon la aferon kaj preparu taŭgajn rimedojn el nia pli granda spertado.

Mi deziras montri al vi ĉiuj, ke ICK ne estas nur surpapera komitato, sed vere vivanta kaj kapabla centra komitato de la tuta Esperanto-movado, ĉiam preta helpi. Legu la raporton pri nia agado de la pasinta jaro en la kongresa libro de Budapeŝto aŭ en la oficiala dokumentaro pri Budapeŝto, kaj vi pli klare komprenos la grandecon kaj diversecon de nia laborado.

John Merchant,
 Prezidanto de ICK.

JAN CERVENKA:

DUM KLARA NOKTO...

Dum klara nokto,
kiam luno brilas per lumo pala
tra fenestro mia,
ekstere vento blovas facilmove,
sopiro vokas vin al mia kor' denove:
[Tiam, ho kara sinjorino mia,
mi vin adoras en silenta miro:]
per forta am', per ĉirkaŭpren' ebria —
mi kisas vin — kun flama amdeziro.
Mi songas nur pri la belec' ravanta,
pri la staturo bele harmonia,
pri via amo min feliĉiganta,
sed dume vi pri l' am' pasia
nenion scias — sinjorino mia! — — .

Trad. Dr. Jos. Fousek.

JAN NERUDA:

LA KRUCO.

Kelke da paŝoj antaŭ la monaĥejo
de Kapucenoj sur Hradčany staras ru-
ĝe kolorita, alta kruco. Ĝi staras ĉi tie
efektive kvazaŭ por kompletigi la belan
bildon, kiun donas la silenta kaj simpla
monaĥejo, la lukse konstruita preĝejo
de Loreta kaj la kvietaj placoj; ĝi staras
ĉi tie kvazaŭ kompletigo de la poeziaj
objektoj, kiuj en la brusto de la inte-
ligenta observanto vekas la tutan mon-
don da ĉarma poezio, faras lian men-
son preskaŭ infana, kaj la spiradon jen
rapidigas jen haltigas.

Sed la kruco ne ĉiam staris ĉi tie
— strange estis kiel ĝi tie ĉi aperis.

En malgranda domo vivis iam du vid-
vinoj. Ili estis najbarinoj; farinte du
paŝojn el unu pordo, vi jam enirus en
la pordon de la alia vidvino. Sed ne
la harmonio transiradis ĉi tie de unu
sojlo al la alia; la vidvinoj vivis en mal-
amikeco malgraŭ tio, ke unu vidvinon la
najbaroj ŝatis kaj ke ŝi efektive pro sia
ĝusteco distingigis.

La alia virino vidviniĝis laŭdire bal-
daŭ, ŝia edzo estis mortigita dum iu
nepermesata entrepreno. Povas esti, ke
pro la malfeliĉo, sed ankaŭ povas esti
ke pro moko de la homoj ŝi fariĝis tiel
malica kiel ŝi vere estis. La malbona
vidvino estis sen infanoj kaj ankaŭ per
tio klariĝas ŝia malamo kontraŭ la alia

vidvino, ĉar tiu ĉi havis por konsolo en
sia soleco filinon tiom belan, ke la naj-
baroj ne aimaniere ol „nobela infano“
ŝin nomis. Si estis efektive knabino
belega; kiam iu rigardis ŝin, opiniis vidi
printempan tagon enkorpiĝintan. Ŝiaj
buklaj haroj aspektis kvazaŭ sunradi-
oj, orbrilantaj kaj en la homan koron pe-
netrantaj. La vangoj estis pli belaj ol
rozoj, la okuloj pli malheaj ol violo kaj
pli puraj ol tonto kaj la haŭtkoloro ha-
vis blankon de printempa tago, deŝika-
ton de velura trikoloreto.

Tiel bela ŝi estis jam kiel infano tri-
jara. La malbona vidvino tiam certigis,
ke la jaroj belecon torigos. Sed pasis
pluaj tri jaroj kaj la knabineto tarigis
eĉ pli bela. Riĉaj homoj el la ĉirkaŭaĵo
donadis al ŝia patrino monon kaj vesia-
ĵojn, por ke ŝi povu la filineton bone kaj
konvene al ŝia beleco eduki; ĉar tia be-
leco estas donaco de Dio kaj ne devas
esti pieddetruita. Sed tio ja plej inci-
tis la malbonan vidvinon kaj ŝi decidis
tion malebligis.

Foje ŝi vokis la filineton de la najba-
rino en sian ĉambron kaj diris: „Vidu
knabino, vi estas bela, kaj la plej belaj
ĉe vi estas viaj dentoj. Sed vi iin bal-
daŭ perdos; tion mi konas; mi amas
vin kaj volas vin helpi. Malfermu la
buŝon, mi ŝmiras al vi dentokarnon per
fortiga ŝmirajo, kaj la dentoj neniam el-
falos“. Kaj ŝi ŝmiris ŝian dentokarnon.

De tiu tempo tratis la alian vidvinon
zorgoj pri la infano anstataŭ ĝojo. Al
knabino la dentokarno kaj la vangoj
ĉiutage tiom ŝvelis, ke la vizaĝo fariĝis
malbelforma. La infano devis sian viza-
ĝon senĉese ĉirkaŭvolvi per vindotu-
koj kaj ŝi spertis neeldireblajn sufe-
rojn. Nek varmigado, nek vaporproce-
doj helpis, la malsano kreskis ĉiam
pli kaj pli, ĝis eĉ la dentoj komencis
pecetiĝi kaj elfali. Ĉiuj bedaŭris la ĉar-
moplenan infanon, la najbaroj pagis eĉ
specialan doktoron, sed nenio helpis!

Okazis dum malvarma aŭtuno. La
knabino, ne plu povante elteni hejme
pro la doloro, vagis tra la placo de Lo-
reta. Doloro kaj bruturmento nefole
reblaj pelis ŝin de loko al loko. Subite
ŝi sentis intensan atakon, kvazaŭ la ka-
po volus disĝi; ŝi konis jam la atakon,
ĉiam dum ĝi elfalis iu blanka denteto.
Ankaŭ nun ŝi elprenis unu el la buŝo.

Mute ŝi paŝis al la monaĥejo de Kapucenoj, eĉ ne sciante, kio ŝin tiel potence allogas. Laca pro la doloro ŝi ne ĝisvenis, sed falis kelke da paŝoj antaŭ ĝi sur la genuojn. Senvole ŝi levis la okulojn al la monaĥejo — sed samtempe ŝi mane kaŝis ilin, ĉar el la preĝeja fenestro eliĝis tia blindiga brilego, kvazaŭ la suno en ĝi rebrilus.

„Ho Dipatrino, helpu min!“ ŝi ekĝemis laŭte. „Kaŝu min sub via sankta mantelo, ne lasu min plu suferi!“

Kaj ne sciante preskaŭ, kion ŝi faras, ŝi rompis vergon el apude staranta arbeto, duoniĝis ĝin kaj kunligis krucforme per herbaĵo, en kiun ŝi ĵus envolvis la enfalintan denton, kisis tiun krucon kaj eniĝis ĝin en molan teron. Ŝi komencis preĝi. Tiam ŝi sonĝis, ke alpaŝis ŝin belega kaj hela virina estaĵo envolvida en brianta, luksa mantelo. La estaĵo karesis ŝiajn harojn kaj vangojn, mefis fingron en ŝian buŝon kaj poste kuŝiĝis ŝin sur siajn genuojn, kaŝante ŝin zorgeme per la mantelo.

Nur matene la timoplena patrino kaj la ŝin helpantaj naibaroj sukcesis trovi la knabinefon. Sed kia estis ilia surprizo! Sur la antaŭe malplena loko leviĝis ligna kruto kaj sub ĝi kuŝis knabino en herbo kaj roso kaj sana kiel freŝrosita rozo. — — —

Ankoraŭ nun la kruco estas mirakla. Se vi, leganto, iros iam al la „Sankta Mario ĉe Kapucenoj“, kiel diras la popolo, atentu la lignan krucon antaŭ la monaĥejo kaj vi trovos en ĝia ligno enpuŝitajn dentojn, kiujn la kredantoj tie oferis por seniĝi de dentdoloroj.

El la ĉefa trad.: Josef Kožený.

EKSPERIMENTO EN BIOLOGIO.

Estas multe da trompo kaj malsincereco en la batalo por la „raitoj de la bestoj“. Kaj ege malprave tiu ĉi batalanta partio agas kontraŭ la biologiaj eksperimentistoj, pentrante ilin kiel kruelajn individuojn, kiuj estas indiferentaj al la vivo kaj sufero de la bestoj. La biologiaj eksperimentistoj oferantaj bestojn servas al pli alta manifestiĝo de la Vivo, ili servas al la homo; tiu ĉi servo devas esti la plej alta servo.

....Kun granda stereotipeco oni pre-

La klopodoj por instigi al la uzado de la lingvo estas ne malpli gravaj ol la propagando. Al la vorto „uzado“, oni kompreneble ne devas doni tro mallarĝan, nek tro materian sencon. Spirita utileco ne estas malpli ŝatinda ol materia . . . Esperanto multmaniere povas esti utila, sed tiun utilecon ĝian oni devas sentigi al la varbitoj kaj pligrandigi. Ni konstante devas serĉi, kiel oni povas igi nian lingvon pli lerninda, ĉar pli utila. Gvidi kurson estas nur parto de la tasko de niaj propagandistoj kaj eĉ plej facila; ĉefa estas konservi kaj daŭre alligi al Esperanto la varbitajn personojn. Pri tio oni ne sufiĉe atentis. La kursestro kredas, ke lia tasko finiĝis, kiam li atingis la lastan lecionon; jakte nur tiam ĝi komenciĝas. Peti de la lernintoj kotizaĵon por la grupo kaj aranĝi feston por soleni ilian esperantistiĝon tute ne sufiĉas; oni devas, jam dum la kurso, doni okupon, celon al ĉiu lerninto, sentigi al li, ke Esperanto estas nur ilo, kiun li uzu por siaj intereso. Ĝuste tial estas multe pli bone aranĝi kurson por samprofesiaj kaj sampartianoj . . .

Hector Hodler, 1919.

zentas al la laika publiko la bildojn de la hundoj de Pavlov, operaciitajn tiel, ke estu riceveblaj puraj suktoj, kiujn sekrecias (eliĝas) diversaj partoj de la digestaj organoj — terurego kaptas la senteman leganton, se li rigardas tiujn bildojn! Sed oni ne diras samtempe, ke ĉiuj ĉi operacioj estas plenumataj en narkoto kaj kun fleĝo absolute identa kun operacioj de homoj.

... Nia tuta scienco pri infektaj malsanoj ne ekzistus, se ne estus eble eksperimenti je la bestoj; miloj kaj miloj da bestoj estis pro tio oferitaj, elsuferis turmentojn, vere, sed kio ĝi estas en komparo kun la miloj kaj miloj da savitaj vivoj de homoj! Kruelaj estas la eksperimentoj je la nervaj organoj de la bestoj — sed ĉu sen ili estus eblaj la operacioj de malsanaj homoj, operacioj, kiuj savas la homajn vivojn kaj faras el invalidoj sanajn individuojn?

... Ĉu la kontraŭulo de l' eksperimentoj je la bestoj ne kuraciĝus sian malsanan infanon per sero kontraŭ difterio? Ĉu li mem, mordita de rabia hundo, ne lasus sin inokuli (vakcini) per materio ŝirmanta kontraŭ rabio? Kaj

tamen, ni ne havus la seron kontraŭ difterio, nek la vakcinaĵon kontraŭ rabio, se estus neeble eksperimenti je la bestoj kaj oferi ilin dum produktado de ĉi tiuj kuraciloj! ... Kaj ni ne forgesu, ke antaŭ ol oni atingis la praktikan eblecon produkti la kuracilojn, estis necesaj centoj kaj miloj da eksperimentoj, kiuj estis sole preparo por tiu ĉi fina celo!

... Se la batalo kontraŭ la eksperimentoj je la bestoj gvidataj en la nomo de mizerikordo volus esti konsekvenca, ĝi devus proklami ankaŭ konsekvencan vegetarismon. Sed eĉ tie ĉi ĝi ne devus halti. Ĉu la vegetalo ne estas ankaŭ manifestiĝo de la mistera Vivo, kiel ni mem? La konsekvencaj vegetaranoj konscias tion kaj gvidataj de la filozofio „ne detruu la vivon“ ili predikas manĝi sole la fruktojn! Kvazaŭ ne estus vivo en la fruktoj?! Guste en la frukto sin vidiĝas la plej mistera kaj eble metafizika flanko de la vivo. La frukto, elpuŝita parto de la matura individuo, ŝajne senviva, — kaj tamen vivoplena, kaŝanta en si la tutajn generaciojn de l' individuoj estontaj! Miregaj perspektivoj de l' estonteco kaj samtempe multe da kruueleco por la estanteco — sen detruo de l' vivo ne ekzistas la vivo!

... Se devas naskiĝi io nova, estonta, devas esti oferata io estanta. Ne pro la oferado mem, sed por kreado de nova ekkono, por plimultiĝo de la ĝisnuna valoroj. En tiu ĉi sfero la celo efektive sanktiĝas la rimedojn, kaj la celo — la multiĝo kaj fiksiĝo de la plej alta al ni konata manifestiĝo de Vivo, la homa individuo — estas tiel alta, ke la oferoj pro la biologia eksperimento estas permeseblaj kaj pardoneblaj.

El la artikolo de MUDr. Karel Klein: „Eksperiment v biologii“ en Naše Doba, Nov. 1920. Trad. R. H.

RADIULOJ!

Radio-aŭskultantoj en Ĉeĥoslovakio, postulu de Radlojournal, ke ĝi represu ĉiusemajne la programon de esperantaj diftendiĝoj, sendataj de la diversaj eŭropaj stacioj. La esperanta radio-programo estas nepre bezna helpilo por ĉiu, kiu deziras per sia aparato aŭdi esperanton

kaj ĝi ankaŭ signifas pruvon pri nia enpenetro en la radio-sferon. Skribu tuj poŝtkarion — kompreneble en ĝentila formo kaj ĉeflingve — al Redakce Radlojournalu, Praha XII., Fochova 62.

PRINTEMPA FOIRO LEIPZIG 1930

2an ĝis 8an de Marto.

Ni atentigas ĉiun vizitanton de nia Foiro, ke en ĝi ili trovos specialan kaj oficialan Renkontejon por la esperantistaj foiruoj. Ĝi estas ĉiutage (ankaŭ dimanĉe) malfermata de la 8a ĝis 18a horo. Estas devo de ĉiu samideano, vizitanta la foiron, ke li vizitu la Renkontejon. Ĝi troviĝas en la centra urbo, en la ejo de la Germana Esperanto-Instituto, Johannisplatz 3. I. kaj en ĝi la samideano povas renkonti alilandajn samideanojn aŭ tien inviti konatulojn, trovi ĉiun hejpon kaj ĉiun informojn rilate la foiron, skribi tie leterojn kaj tien sendigi leterojn.

La Leipzig-a Foiro estas la plej granda socimenfoiro de l' mondo, reŝule vizitata de ĉirkaŭ 175.000 interesuloj, inter ili 29.000 vizitantoj ekssterlandaj el preskaŭ ĉiuj landoj. Ĝi estas kaj internacia (jam pro la partopreno de 700—1000 eksterlandaj ekspozantoj el 24 landoj) kaj universala (ĉar ĉiuj industriaj branĉoj estas reprezentataj en ĝi). Cetere ĝi estas tre superferdebla en 39 foirpalacoj por la socimenfoiro en la centra urbo kaj en speciala ĝiganta tereno por la teknika foiro.

PROGRESO EN LA KAFEJOJ.

Estas nedisputebla fakto, ke poveblo legi nian organon en la publikaj legejoj signifas gravan propagandan faron. Por nia administracio estas absolute neeble donacadi ĝin por tiu celo senpage. Sed ni permesas al ni peti ĉiujn niajn amikojn, kiuj vizitas regule iun kafejon, ke ili bonvolu peti la kafejestron aboni Progreson (ni liveros ĝin por rabatita prezo Kč 16.— poŝtare) aŭ se tio ne estas ebla, do bonvolu ili meti je dispono de kafejaj legantoj ekzempleron kluban aŭ simile. Ni publikigos de tempo al tempo ĉiam en la sama tipografia aranĝo nomaron de publikaj ejoj, kie nia revuo estas legebla. La komenco de la nomaro estas ĉi sube, ni esperu, ke en la kvara numero ĝi estos multe pli longa.

PROGRESO ESTAS LEGEBLA EN JENAJ PUBLIKAJ LEGEJOJ.

Bratislava: Kafejo Muzeum.

Praha: Akademická čitárna en Akadem. dům,
Praha III.,

Studentský domov na Slupi,

Veřejná a universitní knihovna.

Lese- und Redehalle der Deutschen Studenten.
Wien: Ústřední knihovna spolku Komenský.

Neniam, se Vi venas kafejon, forgesu peti „La Progreso“.

NIAJ KAKTISTOJ.

Babilado de Nulo.

Ĉu vi ne sentis internan ĝojon — kiel mi — legante la „Stelitan Kaktion“ en la lasta numero de „La Progreso“? Mia kara Holan, kiom dankema mi estas al vi, ke vi tion al ni rakontis! „Vi devas scii, rakontas Holan, la veraj kaktistoj, tio estas io kvazaŭ sekto de derviŝoj; mi pensas, ke anstataŭ la barbo kreskas al ili dornoj kaj pintoj, tiom pasiaj en tio ili estas. Ĉe ni ekzistas du tiaj sektoj: Klubo de kaktistoj kaj Societo de kaktistoj; kia diferenco inter ili estas, mi ne scias, — mi pensas, ke la unuj kredas, ke la kaktaj havas senmortan animon, dum la aliaj alportas al ili sangoferojn; sed mallonge, la ambaŭ sektoj reciproke sin malamas kaj persekutas sin per fajro kaj glavo sur la tero kaj en la aero.“

Ankaŭ inter ni, esperantistoj, estas tiaj derviŝoj. Se la kaktistoj ŝategas la dornojn kaj la pintojn, tiam la niaj ĉie deziras havi verdajn stelojn kaj steletojn. La verda koloro estas de ili tiom ŝatata, ke la plej derviŝaj derviŝoj dezirus esti tute verdaj kiel la niksoviroj. Ne povante ŝanĝi la koloron de sia haŭto, ili almenaŭ ŝafas verdan vestaĵon, verdajn rubandojn, verdajn ŝtrumpojn, eble ankaŭ verdajn ĉemizojn. Kia plezuro, se oni povas veni al universala kongreso kun insignoj de ĉiuj antaŭaj kongresoj sur si! Se la brusto estas jam plena, kial ne uzi la liberan spacon sur la dorso?! Kompreneble ili ne faras tion por sia propra plezuro, sed por propaĝandi nian sanktan ideon!

Nu, se la kaktistoj havas du centrojn, ni, esperantistoj havas ĉiam almenaŭ du! Ankaŭ pri ni ofte oni ne scias kial estas tiel, sed ankaŭ ni scias sin malami reciproke kaj persekuti unu la alian per fajro, glavo, plumo, voĉo kaj preso — ĉu ne karaj ĝesamideoj?!

Antaŭ la granda milito ni ja havis en Praha Union kaj Asocion, sed ni ne refosu tiun malnovan tombon. Post la milito ni ĉiuj ĉirkaŭprenis nin kaj ŝajnis ke eterna paco venkas. Sed hove! Baldaŭ ekestis Piŝlikanoj kaj Hromadanoj kaj kvankam s-roj P. kaj H. asertis, ke ilia malharmonio estas nur ideo, iliaj amikoj estis pli papaj ol la papo mem. Kaj en la lasta tempo nova uragano dividis nin en Praha: Ni estas aŭ Biskanoj, aŭ Malbiskanoj. Nur malmultaj „sovaĝuloj“ ne partoprenas tiun novan batalon. Sed io simila devis jam veni. Ni bezonas batalon, alie ni nenion farus! Kion fari, se nenio nova inter Hromada kaj Dro Piŝlik, se La Progreso denove aperadas? Kie ĉerpi freŝon kaj energion, kiujn naskas nur akra batalo? Tial

ni estu dankemaj al s-ino Biske, ke ŝi venis al nia ĉefurbo kaj vigligas niajn nervojn per nova batalo, kiu certe iniciatos multan bonon.

Ke ekzistas seriozaj dokumentoj de gravaj institucioj kaj personoj? Ne gravas, verŝajne klaĉo. Batali necesas.

Ekzistas ja inter ni frenezuloj, kiuj opinias, ke la laboro por esperanto povas esti komparata ekz. kun konstruado de granda majesta domo. Ili naive opinias, ke kiel la masonistoj laŭcele, laŭplane kune konstruas, estante devigataj vole-nevole helpi unu la alian, ke ankaŭ ni esperantistoj devas similmaniere aranĝi nian aferon. Ho naŭvuloj! Ĉu vi ne scias, kie ni ĉerpas niajn fortojn? Vi, kiuj rekomencas vian predikadon pri unuecigo de nia movado iu al la diablo! Elpensu nur novan, unusolan organizon por ni! Kunpelu nin hodiaŭ en ĝin kaj morgaŭ matene ni denove kun fiero kaj gloro laboros ĉiu aparte! Ni ja estas individualistoj!

Finante mian babiladon, mi esprimas la fortan esperon, ke tuj post kiam s-ino Dro Biske forlasos nian urbon, ni trovos iun novan instigilon al la batalo, ĉar batalo estas vivo! Vivu Esperanto! Vivu la interna ideo! Nazdar!

JUBILEO DE LA ARKLAMPO.

En la jaro 1930 pasos kvindek jaroj post kiam la ĉeĥa inĝeniero František Křižík, ĝis nun vivanta, eltrovis arklampon de nova sistemo, kiu per sia simpleco kaj fideleco, donante trankvilan lumon kaj permesante tiun dividi, atingis disvastiĝon tra la tuta mondo. La arklampo estis distingita per la unua premio en la tutmonda ekspozicio de Paris 1881, kaj ankoraŭ en Wien kaj München. Sed ankaŭ la financa efekto estis por tiu tempo grandega; angla kompanio aĉetis la patenton por 310.000 aŭstriaĵ guldenoj kaj la germania firma Schuckert elpaĝis por ĝi centmilojn da oraj markoj kiel licenciajn depagojn, ĉar ĝi fabrikis oca 55.000 de tiuj arklampoj. Dum la tutaj jardekoj, kiam la inkandeska lampeto ne estis tiel perfektigita, ke ĝi povu esti grandintensa lumfonto, la arklampo estis plenumanta sian taskon ĉe lumigado de urboj, stacidomoj kaj de grandaj spacoj ĝenerale. — En la pasinta jaro kun granda pompo oni festis la kvindekan datrevenon de la inkandeska lampeto kaj ĉiuj ĵurnaloj de la mondo aŭdigis la nomon de ĝia eltrovinto Edison. La praktikon konfirmitanta arklampo de la ĉeĥa inĝeniero Křižík estis en sia tempo eltrovaĵo egale epoka.

(Hosp. Pol.)

NIA MONATO.

Jam dum marto, kiam la unuaj printempaj sunradioj komencas degeligi la neĝon kaj varmigi la homajn korojn per antaŭseno de la baldaŭa reviviĝo de la tuta naturo, ni komencas pensi, sopiri pri nia monato. Hieraŭ ankoraŭ memorkaresante la lastan — hodiaŭ ni jam sopirkaresas la venontan — Aŭguston, nian monaton!

Tagoj pasas rapide kaj jen — jam alproksimiĝas komenco de nia libertempo. Estas multe da laboro. Kontroli, ĉu ĉio estas en ordo: vestaĵoj, tolaĵoj, ŝuoj, dorsosakoj kaj multaj aliaj necesajoj. La filo kaj la filino jam diligente uzas siajn notlibretojn por fari liston de ĉio

tamen faciligas la portadon. Ĉe la zono leda oficira kartujo kun fotoaparato, jarlibro de UEA kaj esperantaj propagandiloj. En mano dika bastono. La patrino: la dorsosako preskaŭ samgranda, bastono malpli dika, triedro. La infanoj: malgrandaj dorsosakoj, sed longaj bastonoj kun esperantaj flagoj. Ili estas niaj heroldoj. Ili fieras pro siaj fajfiloj, per kiuj ili direktas nian marŝadon, estante niaj gvidantoj (jen bona maniero por trompi la jam laciĝantajn infanajn kruojn!).

Ni ĝojas jam sidi en kupeo vagonara. La dorsosakoj ŝajnis esti tro pezaj por la unua fojo. Malbone ni ankaŭ digestis la scivolemajn rigardojn de niaj samurbanoj. Sed nun, post momento ni jam ekveturos por foresti la tutan



TERITORIA OFICEJO VOJAĜANTA.
Familio Sklenčka.

kunportota. Dume la ĝepatroj interkonsiliĝas pri la vojaĝplano super la landkarto.

Fine ĉio estas preparita. Laboroj en la banko kaj hejme, en la teritoria oficejo estas finitaj, ĉio en ordo, al multaj ĝeamikoj, al la centra oficejo ni skribis, ke ni revenos nur en septembro, do premos nin neniu malbona supozo. La unua tago de la libertempo venas! Ĝi estas uzata por la lastaj kontroloj, preparoj, aĉetoj, pakado. Tamen venas momento, kiam ĉio finiĝas. En la antaŭĉambro vico da dorsosakoj: Granda, malpli granda, malgranda, pli malgranda: patro, patrino, filo, filino! Morgaŭ mi enmetos ankoraŭ iujn freŝajn manĝaĵojn, ĉio cetera jam enestas.

Lasta nokto hejme. Ni volas, sed ne povas bone dormi. La montaro vokas nin! En frua mateno ni ellitiĝas kaj post mallonga horeto ni ekmarŝas jam al la stacidomo.

La patro: granda dorsosako, pezanta multajn kilogramojn. La moderna arango „Mont Blanc“

monaton! Infanoj rapide rigardu ankoraŭ al nia Hradeček, la tutan monaton vi ne vidos ĝin! Adiaŭ! Post unu monato ni revenos sunbrunigitaj, refreŝiĝintaj korpe kaj anime, la patro eble (li deziras tion) perdos ie sur la montaro plurajn kilogramojn. Ni denove revenos al nia hejmo kaj al nia laboro — kaj tiam ni rakontos al vi pri kelkaj el niaj aventuroj. Skl.

Sinjoro al knabo: Ĉu vi ne hontas bafi knabon, kiu estas multe pli juna ol vi? — Knabo: Kial do? Mia instruisto kaj mia patro ankaŭ ne hontas bafi min.

Patro al sia fileto: Vi estas porkido! Ĉu vi scias, kio estas porkido? — Fileto: Jes, patro, mi scias. Ĝi estas infano de porko.

Instruisto: Se iu sinjoro havas sep filojn kaj li permesas al kvar el ili, ke ili fru deŝiri ĉerizojn, kiom da filoj restas hejme? — Neniu, sinjoro instruisto.

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

SIDEJO: GENÈVE, SVISLANDO



Servaro: Bibliografia Servo — Eldona Servo — Ekspozicia Servo — Financa Servo — Gazetabona Servo — Informa Servo — Komerca Servo — Kongresa Servo — Libro-Servo — Reklama Servo — Servo de Respondkuponoj — Oficperada Servo — Hotela Servo — Turisma Servo — Statistika Servo — Vojaĝa Servo.

Teritoria Oficejo por Ĉeĥoslovakio Hradec Králové 623.

KELKAJ CIFEROJ.

Pri cifera ĵonglado oni povas havi diversajn opiniojn. Svisa statistikisto iam diris: „Statistiko estas scienco de la organizita mensoĝo.“ Kompreneble oni povas uzi lerte redaktitajn statistikajn tabelojn por trompi la trompotojn. Sed al organizanto la ciferoj diras ĉiam nur

nudan veron, kiu ne estas ĉiam agrabla, sed ĝia signifo kuŝas ĝuste en tio, ke ĝi estas — la vero! Jen mi donas al Vi, karaj legantoj, kelkajn ciferojn, kiuj montras la veran evoluadon de nia membraro en nia teritorio. Studu ilin iomete. La ciferoj ne estas ŝanĝeblaj, sed povas esti ke mia konkludo ne estas ĝusta.

| En fino de jaroj | 1925 | 1926 | 1927 | 1928 |
|---|---------|---------|---------|--------|
| stato de membroj | 1.147 | 1.227 | 1.337 | 1.378 |
| el ili ekŝiĝis | 219 | 226 | 228 | 242 |
| el malnovaj membroj repaĝis do | 928 | 1.001 | 1.109 | 1.136 |
| novaj aliĝintoj | 299 | 336 | 269 | 217 |
| stato de membroj | 1.227 | 1.337 | 1.378 | 1.353 |
| en fino de jaroj | 1926 | 1927 | 1928 | 1929 |
| Kiom da procentoj ni perdis el la malnova membraro pro la ekŝiĝintoj? | 19.09% | 18.42% | 17.05% | 17.56% |
| Kiom da procentoj formas la novaj aliĝintoj je la ekŝiĝintoj? | 136.52% | 148.67% | 117.98% | 89.65% |

Tiun-ĉi tabelon mi faris por montri al mi la vojon esplori kial en fino de 1929 ni havis malpli da membroj ol en fino de 1928. Ne havinte tiun-ĉi tabelon, mi supozis, ke la ĉefa kulpo estas en tio, ke la revarbiloj anstataŭ en novembro, estis dissenditaj nur en decembro 1928. Sed la tabelo montris al mi, ke mi eraris tiel pensante. Vere estas, ke la revarbado dum 1929 ne havis tiom bonan rezulton kiel dum 1928, sed la ĉefa kialo de la pasintjara malkresko estas la fakto, ke dum 1929 ni ne sukcesis aliĝigi tiom da novaj membroj, kiom da ili ni bezonis por anstataŭi la perdiĝintojn. Sekve kulpas la varbado de novaj membroj! Kial? Ĉu la delegitoj ne tiom energie varbis dum 1929 kiel dum la pasintaj jaroj? Ĉu la teritoria oficejo pli dormis ol laboris sur tiu-ĉi kampo dum 1929? Ĉu eble la materialo, el kiu ni varbas (novaj esperantistoj, malnovaj esperantistoj, kiuj ĝis nun ne estas organizitaj) jam estas plene ekspluatita? Ĉu eble novaj esperantistoj tute ne estis dum 1929? Ĉu la lokaj propagandistoj dum 1929 ne sukcesis en sia

propagando? Ĉu eble montriĝis nesufiĉa la propaganda laboro de niaj naciaj societoj? Jen multaj demandoj, pri kiuj Vi ĉiuj povas iom meditati....

La jaron 1930 ni komencis akurate kaj precize. Ĉio marŝis bone kaj ne estos nia kulpo, se la ciferoj montros plian malkreskon en fino de 1930. Kompreneble, ke ni kaj ĉiuj veraj UEA-anoj en nia teritorio faros nian eblon por ke la ciferoj montrontaj la jaron 1930 dokumentu, ke en Ĉeĥoslovakio ne malkreskas la emo kunlaboradi daŭre je verko serioza....

Stato de la membraro en nia teritorio la 31-an de Januaro 1929:

- 1 Dumviva Membro
- 13 Membroj-Subtenantoj
- 611 Membroj-Abonantoj, el kiuj 94 novaj
- 206 Membroj, el kiuj 51 novaj

831

Delegitoj en 342 diversaj lokoj.

TRA LA GAZETARO.

La januara n-ro de la bonega, angla propaĝanda revuo **International Language** alportas intervjuon kun D-ro Privat. El ĝi ni citas: „Se mi trovos eldoniston konsenteman, mi publikigos ion pri la esprima potenco de Esperanto kaj iloj, kiujn nia lingvo mem kreis al si por esprimi niajn sentojn kaj pensojn. Jam de longe mi konvinkigis, ke ni devas studi kaj konsideri nian lingvon kiel vivantan, tute same kiel iun ajn alian uzatan lingvon. Jam dudek ses jarojn mi uzas ĝin, ĉar mi ĝin eklernis en marto 1903 (la intervjuo okazis en aprilo 1929, NdR), samtempe kun mia lerneja kamarado Hector Hodler. La unuan interparolon kun aŭlandano mi havis kun ĉefa studento, s-ro Eduard Kühnl, kiu poste fariĝis akademiano kaj nun estas en la diplomata servo de la Ĉeĥoslovaka Respubliko. Li tiam vojaĝis al Le Havre, kie okazis la unua renkonto inter francaj kaj anglaj Esperantistoj. El ĝia sukceso venis la ideo organizi pri grandan en Calais en 1904 kaj poste la Unuan Kongreson en Boulogne-sur-Mer en 1905.“

En **Hungara Heroldo**, n-ro 6. (Dec. 1929) ni legas interesan raporton: La historio de la Hungaria Esp-ista Societo Laborista, fondita en 1913. La raporto estas tre detala kaj instruanta pri la poŝtika atmosfero en nia najbara lando. El la raporto ni citas alineon pri malpermesoj kaj persekutoj. „Nia societo devis tre multe suferi polican kaj registaran persekuton. Ĝi malhelpis kaj malhelpas ankaŭ nun nian movadon ĉefe en provinco, kie eĉ niajn komencantajn kursojn oni plej severe kontrolas kaj eĉ malpermesas. Propaĝando kaj aliĝo al SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) deposed 1923 estas malpermesata. Unu post la alia oni malpermesis niajn grupojn en Szeged, Ujpest, Miskolc, Orosháza, Pécs, Tótkomlós, Písvörösvár, Felsőgalla, Győr, Nagykanizsa ktp. Ekzemple en Szeged ni devis kvinfoje refondi nian grupon. Per la plej diversaj pretekstoj oni motivas la malpermesojn, pleje per politikaj kaŭzoj. Sed kelkfoje estas tre kuriozaj la motivoj. Jen por ekzemplo unu el ili. La urbestro de Pécs per tio motivis la malpermeson de nia loka grupo la duan fojon jam, ke „la loka grupo havas nur 26 anojn, kiuj havas anoncitan loĝejon, pro ĉi malgranda anaro la loka grupo ne povas servi la komunan intereson, eble nur la individuajn interesojn de ĝiaj anoj.“ — En la parlamento kvar socialistaj deputitoj parolis en la pasinto pri la persekutoj: Anna

Kéthly (5. 12. 1925), Francisko Reisinger (30. 4. 1926), Karlo Peyer kaj Ludoviko Kabók (19. 4. 1928).“

Kaj nun, kara ĉeĥoslovaka samideano, pripensu, kiel malfacila certe estis la laboro en tiaj kondiĉoj. Sed daŭrigu la raporton kaj vi legos sub alineo **Eldona Fako**:

„Ĝi eldonis gramatikon ĝis nun en 12.500 ekzempleroj, grandan hungaran esperantan vortaron en 4300 ekz., du librojn de Julio Baghy en 4.000 ekz., kantkolekton „Ni kantu“ en 2.000 kaj propaĝandan broŝuron en 3.000 ekz, krome leterpaperojn, poŝtkartojn, kaj multajn aliajn aferojn.“

Tiuj ĉi belaj entreprenoj estas rezulto de la centrigo, proponita de kelkaj gvidantoj: Batta, Schwarcz, Bleier, Sturm, kaj efektivigita en 1924 sub gvidado de S-ano Bleier. — En nia lando oni en unu vilaĝo eldonas „gazeton“, en dua poŝtkartojn, en tria insiĝojn, ĉio kompreneble ne por sia profito, sed por bono de „nia kara afero“. Dume, la centro ne riskas eldoni sian oficialan gazeton, sed lasas tion volonte sur ŝultroj de privataj personoj.

Sed ni daŭrigu la citadon kaj prenu la alineon Statistiko: „En la lastaj ses jaroj la membraro de la societo estas la jena. En 1923 — 510, en 1924 — 836 (702 aktivaj kaj 134 subtenantaj), en 1925 — 1097, (852 kaj 245), en 1926 — 1415 (947 kaj 468), en 1927 — 1467 (868 kaj 599), en 1928 — 1321 (868 kaj 453). El la 868 aktivaj membroj en 1928 estis 699 viroj kaj 169 virinoj.“

Kaj la raporto, subskribita de Ladislao Halka, sekretario de HESL, finas per la fieraj vortoj:

„De 100 membroj al 1300, de 2 grupoj al 22, de nenia havaĵo al bona valoranta ĉ. 10.000 pengojn (cca 60.000 Kč) — jen la vojo de nia societo dum la unuaj 15 jaroj.“

Ni povas nur gratuli al la hungaraj laboristoj esperantistaj kaj samtempe bedaŭri, ke pri la ĉeĥoslovakaj laboristoj ni ne povas legi ne nur ion similan, sed ion ajn.

Pri la unua parolanta filmo en esperanto ni legas en **La Movado**, n-ro 129 (Febr. 1930), ke ĝi estis eldonita de Paramount Kompanio kaj prezentita en Paris la 3 de Februaro, en aparta kunveno, kiun ĉestis ge sinjoroj Warnier, S-ino Meys, S-roj Rousseau, Tuleu, Houbart. Ĝi estas dialogo inter S-ro Hetzél kaj S-ino Chomette kaj estos prezentata en Aktualajoj. Ni klopodas trovi informon, kiam ĝi estos prezentita en nia lando.

H. K. B.:

REVIVIGITA ZAMENHOF.

I.

(Ĉe la preso de tiu ĉi ĉapitro en la antaŭa numero oni erare interŝanĝis la lokon de la alineoj 4a kaj 6a. Sekve la 4a devas esti: „Estas granda... tuta verko!“ kaj la 6a estu: „Deŝala kritiko... bonintenca kriiko.“ Korektu!)

II.

Estas malfacile en unu sola artikolo sufiĉe priskribi la riĉan riko-ton kolektitan en tiun ĉi libron el la jam nericeveblaj eldonaĵoj kaj neatingeblaj fontoj. Oni povas sole malforte skizi la strukturon de tiu ĉi eldonaĵo.

El la parto (I.) „Antaŭparoloj“, en kiu estas kolektitaj antaŭparoloj (17) al lernolibroj, vortaroj kaj tradukoj, parolas al ni instruanto kaj klariganto montranta teoriajn kaj praktikajn principojn kaj ideojn pri lingvo, vortaroj kaj tradukoj. Kelkaj el ĉiuj ĉi artikoloj estas populare-sciencaj analizoj kaj traktadoj de daŭra valoro — ni akcente rememorigu klasikajn enkondukojn al la „Unua“ kaj „Dua libro“! — kaj ĉiuj estas montroj de pensmaniero kaj metodoj de la aŭtoro kaj iniciatinto.

El la parto (II.) „Gazetaritkoloj“ enhavanta grandan vicon (129) da verkoj plejparte nekonataj al novaj esperantistoj, parolas al ni kreinto de la lingvo, fondinto de la movado kaj precipe redaktoro de la unua esperantista gazeto („La Esperantisto“) kaj kiunlaboranto de kelkaj aliaj gazetoj (precipe „Lingvo internacia“ kaj „La Revuo“). Tie ĉi estas amaso da materialo rilatanta nian movadon, multenombraj kaj interesaj informoj propaĝandaj, organizaj, historiaj, literaturaj kaj aliaj. El ili la leganto tre klare vidas unuparte grandajn malfacilaĵojn de la komencanta movado, altparte grandajn korekton kaj paciencon de Zamenhof. Tie ĉi la leganto povas sekvi la agadon de amaseto da adeptoj, malspertaj entuziasmuloj, ofte ambiciaj vantemuloj, furioze interbatalanta pro organizaj principoj, lingvaj reformoj, sendependeco, financaj aferoj, k. s., li povas informi sin pri kelkaj sindonaj kaj oferamaj subtenantoj de la movado (Trompeter, Wasniewski, Javal k. a.) ktp. Ne tro ĝojiga, sed tre instrua estas legado de tiu ĉi parto, tamen forŝiganta niajn simpatiojn al Zamenhof. Kiaj situacioj kaj kia konduto! De kie prenis Zamenhof forton por persisti?

La plej karakteriza parto (III.) „Traktadoj“ — kompleta kolekto da verkoj (14) pri specialaj temoj — montras al ni kritikulon kaj

pensulon kun liaj ideoj kaj ideoj ne sole mondlingvaj, sed ankaŭ humanecaj, politikaj kaj religiaj. Krom la fama kaj konata vasta analizo „Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia“ (neelĉerpebla fonto de bonegaj argumentoj) kaj malp'l konata, sed ankoraŭ hodiaŭ tre instrua kritiko „Esperanto kaj volapük“ (el „La Esperantisto“) kaj elokventa memuaro „Gentoj kaj lingvo internacia“ estas tie ĉi artikoloj pri homaranismo aŭ h'e'ismo, ideo la plej kara al la koro de Zamenhof, tamen trovinta neniujn komprenon kaj sukceson dum lia vivo. Tie ĉi oni vidas la ĉefan celon de liaj malsukcesintaj klopodoj, tie ĉi oni vidas plej profunden en la koron de filozofo kaj filantropo Zamenhof kaj oni plene komprenas la tragedion de lia vivo finita dum tiu terura uragano, dum abomena hombuĉado en la mondmilito. Certe tiu ĉi parto estos nun plej multe legata — sed kun kia rezulto por la ideoj de Zamenhof?

La parto (IV.) „Paroladoj“ — kompleta kolekto de publikaj paroladoj (17) de Zamenhof — estas grandparte bone konata pro la belaj kongresaj paroladoj (8), kiuj mem akre kompletigas bildon de Zamenhof kiel filozofo, kiun oni vidas en liaj traktadoj, kaj montras lin kiel gvidanton kaj oratoron, kvankam li ne amis tiujn ĉi rolojn en la movado. Notinda estas eble atentigo, ke en tiu ĉi ĉapitro de la libro estas ankaŭ teksto de gramofona parolado de Zamenhof el la jaro 1904a.

Eble la plej grandan kaj pravan atenton trovos la parto (V.) „Leteroj“, kolekto neatendite granda (375), kvankam nekompleta (nepovanta esti kompleta). La plej granda parto (V. B.) da leteroj (318) estis ĝis nun nekonata eĉ al malnovaj samideanoj, ĉar ili estas en privataj manoj kaj ĝis nun ne estis publikigitaj. Ĉi tie oni estas plej proksime al homo Zamenhof, ĉi tie oni plej multe sentas kaj admiras liajn nekredablajn bonecon kaj paciencon, ĉi tie sentema leganto kunsuferas la multenombrajn dolorojn de Zamenhof kaŭzitaĵn ne sole de kontraŭuloj, sed tre ofte de — amikoj laŭ eternaj paroloj de poetoj (Havlíček: Dio, gardu min kontraŭ la amikoj — antaŭ la malamiko mi mem min gardos!“). Kia galerio de personoj, kia diverseco de temoj, kiom da instruoj kaj konsiloj! Oni komprenas, ke al Zamenhof skribis homoj de la plej diversaj nacioj, aĝoj, profesioj kaj kleroj pri gravaj, malgravaj kaj bagatelaj aferoj, sed oni devas scii, ke Zamenhof — al ĉiu respondis; dio scias, kiel li povis tion atingi! Antaŭ la leganto preteriras longa filmo de publikaj kaj intimaj aferoj de Zamenhof kaj de granda nombro de adresantoj kaj adre-

satoj — interesa, instrua kaj kortuŝanta filmo ebliganta la rigardon malantaŭ la kulisojn.

La lasta, sed ne neĝrava parto (VI.) „Poe-moj“, estas neĝranda, tamen kompleta kolekto da originalaj poemoj (9) plejparte konataj eĉ al novaj samideanoj. Neniu neos, ke tiuj ĉi verkaĵoj vidiĝas veran poetan talenton videblan cetere el multaj bonaj tradukoj de diverslingvaj poemoj de eminentaj poetoj de mond-literaturo. Tiuj ĉi originalaj poemoj havas ne sole artan valoron, sed ili altiras ankaŭ per sia enhavo, ĉar ili en poezia formo esprimas la programon de la vivo de la aŭtoro, liajn idealojn kaj ideojn humanecajn, politikajn, religiajn kaj Internaci-lingvajn estante tiel konformaj al liaj prozaĵoj.

Ellasita estas la parto de ĝenerale konataj „Lingvaj respondoj“ eldonitaj aparte kaj tial por tiuj facile havigeblaj kaj kredeble de multaj posedataj.

Krom tio estas ellasitaj kelkaj aliaj lingvaj artikoloj, precipe tiuj pri projekto kaj konkreta proponoj de reformoj de la gramatiko kaj vortaro en la unuaj jaroj de esperanto, tiuj artikoloj (konataj el represoj de d-ro Javal), kies represadon Zamenhof mem ne deziris, ĉar li faris ilin kontraŭ sia konvinko sole por kontentigi tiamajn samideanojn (cetere jam tiam ili estis malakceptitaj).

Al la ampleksa, bele bindita verko (604 p. de granda formato) estas aldonitaj faksimilaĵoj (6) de presitaj kaj manskribitaj tekstoj kaj fotografa reproduktaĵo de du unuaj paĝoj de la gazeto „La Esperantisto“ — la leganto mem povas (se li tion scias) studi la skribon de Zamenhof kaj fari al si imagojn pri la aspekto de unuaj esperantaj eldonaĵoj. En frunto de la libro estas bela portreto de Zamenhof.

Tiu ĉi mal'onga karakterizo de la enhavo ne povas sufiĉe montri, kiom da grandega laboro de Zamenhof estas amasigita en tiu ĉi libro La leganto, kiu konas vicon da multaj kaj grandaj tradukaj verkoj de Zamenhof kaj kiu scias, kiel malfacilege batalis Zamenhof por gajni ĉiutagan panon por sia familio, devas admiregi la vastan kaj multspecan agemon de tiu malforta homo kaj neordinaran energion de tiu modesta viro, al kiu la sorto estis tiom malafabla ĝis la morto. Nia estimo al la laboro kaj persono de Zamenhof ne povas nekreski ju pli multe ni studas la laboron kaj vivon de Zamenhof kaj historion de esperantismo. Certe tiu ĉi verko vekos pli grandan kaj ĝeneralan intereson por tia studo ĉe la esperantistaro.

Sed tiu ĉi verko estas leĝaĵo interesa kaj instrua ne sole pro siaj enhavo kaj ideoj, sed ankorat' pro siaj modela lingvo kaj stilo. Estas

bone konata la ideale simpla kaj klara esprimmaniero, kiu altiras nin al verkoj de Zamenhof — kaj en tiu ĉi libro oni povas sekvi la tutan evoluon de la neimitibla pura stilo de Zamenhof. Ankaŭ pro tio tiu ĉi libro certe estos objekto de studoj kiel de simplaj legantoj tiel de specialistoj.

KLUBAJ ESTRAROJ

zorgu, ke en la kluba biblioteko troviĝu la ĵus preparolita libro.

LINGVA FAKO

25. TEXT K PĚKRLADU.

Národnost a mezinárodnost. Mezi národností a mezinárodností není protivy, naopak shoda; národové jsou přirozenými orgány člověčenstva. Člověčenstvo není něco nadnárodního, ono je organizační jednotlivých národů. Jestliže tedy jednotliví národové usilují o svou samostatnost a snaží se rozbít státy, v nichž doposud byli, tož to není boj proti mezinárodnosti a lidstvu, nýbrž boj proti utlačovatelům, kteří zneužívali států k nivelisaci a politické jednotvárnosti. Lidstvo nespěje k jednotvárnosti, nýbrž k jednotě; a právě osamostatnění národů umožní organickou asociaci, federaci národů, Evropy a celého lidstva.

T. G. Masaryk.

Po leĥĉim textu 24. (jehoŝ preklad moŝno zaslati do 5. března) uveřejňujeme pro pokročilejší čtenáře hořejší text, jehoŝ preklad zašlete nám nejdéle do konce března. Nejlepší preklad bude rovněŝ odměněn pěknou knihou.

Nemůžeme jinak, než vrátiti se k svému starému přesvědčení (či jen domněnce?), že tyto texty se hodí nejen t. zv. izoluloj a samoukům, nýbrž zejména i klubům k oživení aspoň jedné jejich schůze v měsíci. Uložte přítomným na schůzi klubové, aby náš text doma přeložili a přinesli do příští schůze. Tam pak buďtež jednotlivé překlady porovnávány, což bude pramenem zajímavých a velmi poučných debat nejen o stránce jazykové, ale často i o obsahové. Po takové debatě pošlete pak aspoň jeden preklad redakci. Po uveřejnění překladu v Progresu má vaše nejbližší schůze možnost pořádat dozvuky jazykové debaty schůze první.

Podezřele = *suspektige, suspektinde*. První znamená: budící podezření, druhé: hodno podezření. Lze užití jednoho nebo druhého podle toho, který odstín chceme vyjádřiti,

HRSTKA OBCHODNÍCH VÝRAZŮ

| | |
|---------------------|---------------------|
| obchod | komerco |
| obchod tuzemský | komerco enlanda |
| obchod zahraniční | komerco eksterlanda |
| obchod výměnný | komerco interŝanĝa |
| obchodní společnost | komerca kompanio |
| obchodní artikl | komerca artiklo |
| obchodní odvětví | komerca branĉo |
| dovoz | importo |
| vývoz | eksporto |
| odbyt | debĭto |
| spotřeba | konsumo |
| spotřebitel | konsumanto |
| firma | firmo, firmao |
| pán, šéf | ĉefo |
| společník | kompaniulo |
| účetní | librotenisto |
| obchodní příručí | komizo |
| zboží | komercaĵo, varo |
| vzorek | specimeno |
| ceník | prezlisto |
| nabídka | oferto |
| poptávka | demando |
| skladiště | tenejo |
| zásoba | provizo |
| úvěr | kreditó |
| věřitel | kreditoro |
| dlužník | ŝuldanto |
| pohledávka | bonhavo |

VILÉM POPPE MORTIS.

Multaj samideanoj en la vasta mondo koni lin, ŝatis lin ĉiuj esperantistoj de orienta Bohemio. En la antaŭmiitaj jaroj li — tiam direktoro de alkoholfabrike en Pardubice — fidele staris kaj laboris apud Dro Schulhof. Konvinkita kaj fervora esperantisto, li ĉiam estis preta fari kion ajn por nia afero. Neniam li zorgis, ĉu la laboro alportos gloron kaj dankon al li, li volonte plenumis ĉiun eĉ la plej etan afereton, ĝojante, ke li povas ion fari por esperanto. — Post la milito lia sorto nebuliĝis. Li forlasis la postenon de fabrikdirektoro, aĉetis dometon en Svinárky apud Hradec Králové, supozante — kiel fakulo — ĉiam trovi bonan vivotenan okupon. Sed vane li k'opodis trovi daŭran okupadon. Lia situacio malpli boniĝadis de jaro al jaro. Vane k'opodis kelkaj amikoj helpi lin. Li persistis tiom longe, kiom lia karaktero permesis. Reveninte el Uhorská Ves, kie li dumvintre laboris, li vizitis min jaŭde, plendante kaj esperante, ke li trovos la promesitan okupon en Josefov, kien li posttagmeze veturos. Verŝajne lia eta espero ne

estis plenumita, ni ne vidis lin plu kaj sabaton, la 8-an de Februaro li per pafado de sia revolvero ĉesliĝis sian mizeran vivon... Ripozu en paco, kara, fidela amiko! Skl.

REDAKCIA.

Neposilejte nám peníze

poštovní poukázkou. Ztratíte-li složku naši, kupte si na poštovním úřadě za 5 haléřů t. zv. biancosložku a na ní kromě obvyklého textu napište ještě na příslušném místě číslo a jméno našeho účtu: Praha 34.271 Časopis La Progreso Praha VII.

Tento pohodlný a levný způsob zaveden byl počátkem tohoto roku.

Adresŝanĝo. Se vi loĝas nun en alia urbo kaj informas nin pri via nova adreso, skribu ankaŭ la malnovan. Nia adresaro estas aranĝita laŭ la lokoj, pli precize, laŭ la poŝto de via loko.

Jarkolekto 1927. La malnovajn jarkolektojn de La Progreso (VII—XI.) ni povas liveri al vi po 14 Kč afrankite. La jarkolektoj I.—VI. estas trege malmultaj kaj estas vendataj po 20 Kč.

Profesor. Nesouhlasíme s Vámi, že článek „Škola a my“ se stal nečasovým, jelikož vyšel teprve v lednu, ač se v něm mluví o tom, že Svaz a Institut má v zimním období vítanou příležitost uspořádati kursy pro přípravu k státním zkouškám z esperanta. Snad byste měl pravdu, kdyby jedna nebo druhá z těchto institucí ony kursy byla skutečně pořádala. To však se nestalo. Proto, jelikož všem zimním obdobím není ještě konec, článek ten nechť slouží za včasné upozornění připravit se řádně aspoň na příští podzim. Ze péče o takové kursy je věci v prvé řadě Institutu, v tom s Vámi ochotně souhlasíme.

La tekstoj de H. Hodler, publikitaj sur p. 5. kaj 19. estas cititaj el la libro: Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko, eldonita de U. E. A. Genève, (168 p. 12½×7½ cm, 20 Kč). Ni rekomendas plej sincere.

La 3. n-ro estos dediĉata al la jubileo de 80 jaroj de nia prezidento T. G. Masaryk. Por la venontaj numeroj ni preparas artikolojn: Ĉeĥa gazetaro pri esperanto en 1929., Esperantomovado en ĈSR en 1929., 22. Universala Kongreso en Oxford., Odpovědi na jazykové dotazy k. a.

Korektu! Sur p. 2. kolono 1. linio 12 mals. legu „lia“ anstataŭ „ĝia“. — Sur p. 8., kolono 2. linio 10. mals. legu: El tiu kvanto 1700 ekz. estis antaŭpagitaj. (22. 2. 1930.)

BULTENO**DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333**

NUMERO 28.

FEBRUARO 1930.

La 11. komitata kunveno

okazis merkrede la 19. Februaro en Praha, Odborový dům en ĉeesto de S-roj Bloch, Eiselt, Herzigová, Hromada, Tarantíková; Ŝustr kaj Jandík. El la protokolo ni elprenas kelkajn informojn, kiuj sekvas.

La ĝenerala kunveno de ĈAE

okazos laŭ decido de la lasta komitata kunveno

en Praha la 13. Aprilo 1930.

La ejo kaj la programo estos publikigita en la venonta Bulteno. Jam nun estas akceptataj proponoj por la tagordo.

La ĉeĥoslovaka kongreso 1930

ne okazos pro la kaŭzoj prezentitaj en nia lasta Bulteno. Anstataŭ tio ni planas komunan kunvenon de la estraroj de ĈAE kaj GEL, pri kiu ni informos detale post interkonsento kun GEL.

Invito al Dresden.

Dum Pentekosto (7.—9. Junio) okazas en Dresden la 19. kongreso de germanaj esperantis'oj. Ĝia Loka Kongresa Komitato sendis al nia Asocio koran inviton al partopreno, en kiu ĝi interalie skribas: „Ni promesas al vi, ke la vizitantoj el ĈSR estos speciale bonvenaj en Dresden kaj ke ni en estontaj kongresoj viaj ne forĝesos vian nunan sintenadon kaj ankaŭ vizitos vin multnombre.“

La komitato de ĈAE traktis pri tiu ĉi invito kaj akceptis ĝin. Konsiderante, ke en Dresden okazos samtempe Internacia Ekspozicio de Higieno, kiun multaj ŝatos viziti, konsiderante plie, ke Dresden estas por konsiderinda parto de niaj membroj tre facile vizitebla kaj fine, ke la kongreso prezentas specon de internacia kongreso, la komitato estas preta gvidi la preparajn laborojn por speciala karavano ĉeĥoslovaka el Praha. Eventuale aj rabatoj kaj faciligoj estos sciigitaj en

la venonta numero. Jam nun ni akceptas aliĝojn, eĉ nedefinitivajn.

Slovaka Slosilo

eldonita de ĈAE sub redakto de D-ro Kamaryt estas bela 32-paĝa kajereto 8×12 cm, kiu enhavas koncizan gramatikon, kelkajn ekzercojn kaj vortaron esperanto-slovakon (p. 10—32). Ĝi tre taŭgas por propagando precipe en Slovakio. Ĝi kostas Kč 1.20 (afrankite) kaj estas mendebla ĉe nia Asocio, plie ĉe D-ro St. Kamaryt, Bratislava, Telocvičná 3. Aĉetu kaj disvastigu!!

Afero Biske.

Por eviti ĉian miskomprenon pri la rolo de S-ino Biske, la komitata kunveno (19. 2. 30) decidis, ke estos eldonita publika informo, laŭ kiu Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista deklaras ke ĝi, kiel oficiala centro de ĉs. esperantistoj, havas nenion komunan kun la agado de la sinjorino, kiu sin nomas Doktoro Clara Biske, precipe ne kun ŝiaj privataj kursoj en la ejo universitata, nek kun la tendenco krei novan klubon en Praha.

Kotizoj.

Membroj kiuj ne pagis por 1929 kaj 1930 estas petataj sendi sian kotizon kiel eble plej baldaŭ. La kotizo estas 16 Kč jare kaj plej facile vi ĝin sendos, aĉetante en iu ajn poŝtofiĉejo blankopagilon (bianco-složenku) kaj pleniĝante ĝin krom la kutima teksto per indiko: Praha 9.602 Svaz ĉeskoslovenských esperantistů Praha-VII.

Libraj premioj por ĈAE membroj

estis plimultigitaj. Nova premio estas la libreto Vavris; Sherlock Holmes en la servo de la hispana trono, parodio de detektivaj noveloj, tradukita de Ed. Kühnl. Senpage sendata al membroj 1930. Indiku sur pagilo vian deziron per litero SH.

Rud. Hromada, ĝen. sekr.

Novinová sazba povolena Reditelstvem pošt a telegrafů v Praze č. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. — Presis JAN MINÁŘ NYMBURK.